# SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 089.2

Vol. 22, n-ro 3(89)

15. 5. 1971.

Aperas sesfoje jare, Jarabono 60 steloj aŭ 4 us. dol aŭ 60 din.



**El la enhavo:**

**W. A. De Smet:** La nomoj de la cetacoj, III (Nova Biol. Nomenklaturo)
**C. Stop-Bowitz:** Zoologia nomenklaturo
**Ryĵov, Gonĉarov:** Rolo de solvantoĵ ĉe kompleksiĝoj en solvaĵoj
**V. Ja. Suponickij:** Pri limfocit-ecoj de limfoglandoj
**M. Halvelik:** Skatolo de Pandora kaj ĉevalo de Troje
Sciencaj novaĵoj


## LA GRUPO POR KRISTALIGADO EN LA EŬROPA FEDERACIO DE KEMIINĜENIERAJ SCIENCOJ


**(R. Rychly, Üsti nad Labem, Ĉeĥoslovakio)*)**


En la jaro 1953. estis establita la Eŭropa federacio de kemiinĝenieraj sciencoj kun la celo pliboniĝi reciprokan kunlaboron kaj informadon de specialistoj en diversaj landoj. Nuntempe la Federacio havas pli ol 45 naciaj societoj en Eŭropo kaj havas kontaktojn kun gravaj neeŭropaj kemiaj societoj.

Propra aktiveco de la Federacio havas pezocentron en 10 »Laborgrupoj«, en kiujn asociiĝas elstaraj fakuloj.

En la jaro 1970. estis fondita la Grupo por Kristaligado (teknika preparo de kristaloj). La grupo havas 20 membrojn (la prezidanto: Inĝ. J. Nyvlt, Dr. Sc. ; Sekretario: Ing. R. Rychly, C. Sc. — ambaŭ el la Esplora Instituto de Neorganika Kemio, Usti n. L., Ĉeĥoslovakio — kie ankaŭ estas la sekretariejo).

Inter la membroj de la grupo estas nomoj tre konataj el la scienca literaturo, ekz.: J. W. Mullin kaj R. F. Srtickland-Constable el Anglujo; G. Matz, B. Honigmann kaj Th. Messing el Okcidenta Germanujo; U. Fasoli el Italujo; van Damme-van Weele kaj de Jong el Nederlando k.a.

*) Esplora Instituto de Neorganika Kemio.

La grupo por kristaligado akceptis la ĝeneralan programon dum la unua kunsido, la 8an-10an de Septembro, 1970. en Ĉeĥoslovakio. La labor-celo estas fondi organizan bazon por incito de studado de teknika kristaligado (teknika preparo de kristaloj) el fandoj, vaporoj kaj solvaĵoj.

**La aktiveco de la Grupo** estos ĉefe en la:

— organizado de la centra kartoteko kun ĉiuj atingeblaj indikoj pri la kinetiko de kristaligado;

— reciproka informado pri la konferencoj, simpozioj pri kristaligado, ktp.;

— la propono de la specifiko de ĉiuj necesaj indikoj por la tuta kaj klara priskribo de fundamentaj kvalitoj de sistemoj en studoj pri kristaligado;

— unuigo de simboloj; nocioj kaj difinoj el la fako de teknika kristaligado;

— aprezo de mezur-metodoj por la akiro de fundamentaj indikoj kaj la rekomendo de unuecaj metodoj;

— aplikado de la rezultoj de teoriaj studoj por la projektoj de aparatoj kaj procesoj;

— organizo de labor-kunvenoj kun reciproka infomado pri la lastaj laboroj; kun diskutoj pri specialaj temoj;

— organizado de internaciaj simpozioj pri la teknika kristaligado;

— kunlaboro kun la naciaj organizaĵoj de la Federacio;

— inviti gastojn-fakulojn el la landoj, kiuj ne estas membroj de la Federacio;

**La konkreta programo** por la plej proksima periodo estas:

— prilaboro de la resumo de aktivecoj en la fako de teknika kristaligado en la landoj de delegitoj;

— diskutoj pri specialaj problemoj (la unua estis dum la kunveno de la Grupo por kristaligado, la 24-an de Marto, 1971. en Okcidenta Germanujo);

— organizado de la 5-a Internacia simpozio pri teknika kristaligado (ĉe la SHISA Kongreso, la 10-15-an de Septembro, 1972., en Mariánské Lázně (Marienbad), Ĉeĥoslovakio);

— prilaboro de sistemo de terminoj por la dokumentado en la fako de teknika kristaligado;

— unuigo de simboloj uzitaj en la teknika kristaligado, ktp.

(Informoj en Esperanto ĉe la sekretario).